

Ne nur vortoj, sed ankaŭ gramatikaj reguloj ŝanĝiĝas
Claude Gacond, 214-a radioprelego, 1967.11.15 & 1967.11.18

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtundan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La roma imperiestro Julius Caesar draste resumis sian venkon super la keltaj popoloj per tri latinaj verboj :

A.- « **Veni, vidi, vinci !** »

Cl.- Tiu frazo fariĝas en esperanto :

A.- « *Mi venis, vidis, venkis !* »

Cl.- Kiam oni atente ekzamenas la tradukojn de tiu latina frazo en la franca, tiam oni rimarkas, ke ĉirkaŭ la jaroj 1950 okazis grava ŝanĝiĝo en la uzo de la verbaj tempoj. Dum generacioj la aserto de Julius Caesar estis francigita per :

A.- « **Je vins, je vis, je vainquis !** »

Cl.- Kaj nun ĝi estas francigita per :

A.- « **Je suis venu, j'ai vu, j'ai vaincu !** »

Cl.- La pasinta tempo nomata en la franca **passé simple** aŭ **prétérit**,

A.- esperantigo **simpla pasinteco**,

Cl.- ĉesis esti uzata profite al alia pasinta tempo nomata **passé composé**,

A.- esperantigo **komponita pasinteco**.

Cl.- Dum la **simpla pasinteco** uzis verbajn finaĵojn, la **komponita pasinteco** bezonas helpverbon plus pasintan partupon. Tiu nova verba formo respondas proksimume al :

A.- « *Mi estas veninta, vidinta, venkinta !* »

Cl.- En la estonta tempo okazas sama evoluo. La tempo nomata **futur simple**,

A.- esperantigo **simpla futuro**,

Cl.- pli kaj pli cedas la lokon al tempo ĝenerale uzata sed ne ankoraŭ instruata en la lernejoj. Tial ni ne povas diri la nomon de tiu futura tempo, ĉar nomon ĝi ankoraŭ ne ricevis. Ni donu ekzemplon. Por diri :

A.- *Ĉu vi aĉetos aŭton ?*

Cl.- la francilingvanoj tendencas ĉesi diri :

A.- **Achèteras-tu une auto ?** aŭ **Est-ce que tu achèteras une auto ?**

Cl.- Anstataŭe ili pli kaj pli ĝenerale diras :

A.- **Vas-tu acheter une auto ?** aŭ **Est-ce que tu vas acheter une auto ?**

Cl.- Tradukita en esperanto tiu nova esprimmaniero donas :

A.- *Ĉu vi iras aĉeti aŭton ?*

Cl.- Kiel vi konstatas, la verbo **iri** funkcias kiel helpilo kaj la verbo **aĉeti** restas je la infinitiva formo.

Ne nur vortoj, sed ankaŭ gramatikaj reguloj ŝanĝiĝas
Claude Gacond, 214-a radioprelego, 1967.11.15 & 1967.11.18

A.- Ni ne volas instrui al vi la francan lingvon, sed simple ni deziris montri, ke ne nur vortoj naskiĝas, disvastiĝas kaj mortas, sed ankaŭ gramatikaj formoj. La vortoj kaj la reguloj propraj al ĉiu lingvo estas efemeraj simboloj de pli profunda realaĵo.

Cl.- La franca lingvo ekzemple bezonas verbajn tempojn, kiuj esprimas la pasintecan aŭ estontecan. Tiuj tempaj formoj povas ŝanĝiĝi. Ili estas efemeraj kiel ĉiuj lingvaj signoj. La realeco estas, ke la homa psiko distingas tri ĉefajn periodojn en la disvolviĝo de la agadoj. Agado povas okazi. Agado povas esti okazinta. Agado povas esti okazonta, aŭ vidita kiel okazonta.

A.- Esperanto simboligas tiujn tri periodojn per la tempaj markoj **as**, **is** kaj **os**.

Cl.- La franca havas longan historion. Atenta trastudo de malnovaj tekstoj montras, ke la estonta tempo esprimiĝis antaŭ multaj jarcentoj laŭ reguloj, kiuj hodiaŭ tute malaperis. Anstataŭ diri :

A.- *Mi rigardos, vi difinos, li vendos,*

Cl.- la malnovfranca proksimume diris :

A.- *Mi por rigardi havas, vi por difini havas, li por vendi havas.*

Cl.- Tio donas en la nuna franca lingvo :

A.- ***J'à regarder ai, tu à définir as, il à vendre a.***

Cl.- La nuna klasika franca estonta tempo estas la filo de tiu praformo. Ĝi donas :

A.- ***Je regarderai, tu définiras, il vendra.***

Cl.- La finiĝoj de la nuna franca estonta tempo tial estas do fakte la helpverbo **havi** en la as-tempo.

A.- Ĉu esperanto konos similajn ŝanĝiĝojn ? Tre verŝajne jes ! Nur lingvo, kiu vivas, kapablas iom post iom modifiĝi pro eksteraj influoj. Cetere, se oni bone ekzamenas esperanton, oni rimarkas iun stilan evoluon.

Cl.- La senpera verbigo de la adjektivoj estas fenomeno tipa al esperanto. Dum en la ceteraj lingvoj oni ĝenerale diras : *Vi havas bonan koron*, aŭ *Vi estas bonkora*, per senpera verbigo de la adjektivo *bonkora* esperanto povas pli draste diri : *Vi bonkoras*.

A.- Tiu senpera verbigo de la adjektivoj ebligas interesajn stil-efektojn. Por : *Dio estu laŭdata !*, oni povas diri : *Laŭdatu Dio !*

Cl.- Por igi malpli peza la frazon : *Se vi estus veninta, vi estus vidinta interesan filmon*, multaj junuloj ŝatas uzi la formon : *Se vi venintus, vi vidintus interesan filmon*.

A.- Ekzistas en esperanto multaj tiaj latentaj ebloj, kiuj hodiaŭ estas sporade uzataj ĉefe en poezio kaj tradukado. En la venonta prelego ni provos malkovri kelkajn el ili.

Cl.- La hodiaŭaj ekzemploj ĉerpitaj el la franca lingvo devas nin helpi kompreni, ke la homaj idiomoj senĉese evoluas. Ne nur vortoj ŝanĝiĝas, sed eĉ verbaj formoj kaj gramatikaj reguloj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-